



# PENSEO

N-ro 143

Sept./2003

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 13-a jaro <http://www.elferno.net/penseo.htm>

**Lusin** (1881—1936)

## De Centherba Ĝardeno al

### Trigusta Legočambro

Mi ne sciis kial mia familio decidis sendi min al lernejo kaj eĉ elektis tiun lernejon kiu estis famkonata en la tuta urbo pro sia plej severa disciplino. La kaŭzo eble kuŝis en tio ke mi difektis la teran muron dum eltiro de poligonatoj, eble en tio ke mi ĵetis brikon transen en la korton de la najbara familio Liang, eble en tio ke mi saltis de la ŝtona putbalustrado...nenion mi povis scii. Per unu vorto, tio signifis la finon de mia frekventon al la Centherba Ĝardeno. Adiaŭ, miaj griloj! Adiaŭ, miaj framboj kaj figoj!

En la distanco de malpli ol duon-ligo oriente de nia domo, trans ŝtona ponto, estas la hejmo de mia instruisto. Vi eniris tra nigre lakita bambua pordo kaj la tria ĉambro estis la klasĉambro. Alte sur la centra muro pendis la epigrafa tabulo: Trigusta Legočambro.

Sub la tabulo estis pentraĵo kun bildo de graso cervo kuŝanta sub maljuna arbo. Ne troviĝis monumenta tabuleto de Konfuceo, ni do riverencis antaŭ la tabulo kaj la cervo, unufoje por Konfuceo, kaj duafoje por nia instruisto.

Kiam ni duafoje riverencis, nia instruisto afable reciprokis. Li estis maljunulo alta kaj maldika, kun grizaj barbo kaj hararo kaj li portis grandajn okulvitrojn. Mi havis profundan respekton al li, ĉar jam delonge mi aŭdis ke li estas tre honesta, modesta kaj erudicia homo en nia urbo.

Mi forgesis de kie mi informiĝis ke ankaŭ Dongfang Shuo<sup>3</sup> estis erudicia klerulo kiu konis iun insekton kun nomo de *guai-zai* kiu formiĝis rezulte de la enkorpiĝo de la fantomo de maljuste mortigita homo kaj fandiĝis se vi verŝis vinon sur ĝin. Mi forte deziris scii la detalojn de tiu ĉi historio, sed Mama

Chang ne povis rakonti al mi, ĉar finfine ŝi ne estis erudicia klerulo. Nun la ŝanco venis. Mi povis demandi la instruiston.

“Kio estas la insekto *guai-zai*, s-ro?” mi haste demandis, kiam mi ricevis de li novan lecionon kaj estis revenonta al mia sidloko.

“Mi ne scias!” verŝajne li fariĝis malagrabla, eĉ aspektante iom kolera.

Nur tiam mi konsciis, ke lernantoj ne devas demandi pri tiaj aferoj dediĉante sin nur al studo. Ĉar li estis erudicia klerulo, estis neeble ke li ne sciis. Kiam li diris, ke li ne sciis, tio signifis, ke li ne volis respondi al mi. La plenkreskuloj ofte tiel kondukis, kiel mi plurfoje sciis el mia sperto.

Sekve mi tute dediĉis min al studo. Tagmeze mi praktikis kaligrafion, kaj vespere mi provis duopigi versajn liniojn<sup>4</sup>. Dum la unuaj kelkaj tagoj la instruisto estis severa kontraŭ mi, sed poste li traktis min pli bone, tamen la lecionoj iom post iom plimultiĝis, kaj ankaŭ la versaj linioj duopigitaj iom post iom plilongiĝis de tri ideogramoj al kvin kaj fine ĝis sep.

Malantaŭ la Trigusta Legočambro ankaŭ estis ĝardeno, kvankam malgranda, kie vi povis grimpi sur terason por pluki vintrajn prunflorojn aŭ serĉi sur la tero aŭ laŭrarbo cikadŝelojn. La plej bona okupo estis kapti muŝojn por nutri la formikojn, ĉar tio kaŭzis neniom da bruoj. Sed estis neeble, se tro multe da niaj kunlernantoj iris al la ĝardeno samtempe aŭ restis tie tro longe kaj tiam la instruisto ekvokis en la klasĉambro:

“Kien ĉiuj foriris?”

Tiam ni revenis al la klasĉambro unu post la alia. Estis ne dece, se ni revenis kune. Li havis batilon, kiun li tamen malofte uzis. Estis ankaŭ regulo puni lernantojn per surgenuigo, kiun li ankaŭ malofte uzis. Ordinare li nur rondigis siajn okulojn kriante:

“Daŭrigu vian legadon!”

Kaj ni ĉiuj voĉlegis plengorĝe por momento, kaj tiam ni faris bruon vere similan al tiu de bolanta akvo.

Ni ĉiuj legis malsamajn tekstojn:

“Ĉu humanismo estis fora? Kiam mi serĉas ĝin, ĝi estas ĉi-tie.”<sup>5</sup>

“Por moki dent-mankan homon oni diras: La hundejo estas larĝe malfermita.”<sup>6</sup>

“Sur la supra naŭa ĉielo la drako kaŝas sin kaj atendas sian tempon.”<sup>7</sup>

“Malfekunda tero, kun multaj produktaĵo de malsupera speco miksitaj kun supera produktaĵo; ĝiaj tributoj, matoj, oranĝoj, pampelmoj.”<sup>8</sup>

...

Ankaŭ la instruisto mem voĉlegis. Poste, niaj voĉoj mallaŭtiĝis, kvietiĝis, nur li ankoraŭ laŭte voĉlegis:

“Ĉe ŝvingo de lia fera scepro ĉiuj ekmiris...La ora glaso superpleniĝis, sed milo da pokaloj lin ne ebrigiis...”<sup>9</sup>

Mi supozis, ke tio estis treege bona verko, ĉar ĉiufoje kiam li legis ĉi tiun tekston, li ridetis, levis sian kapon, ŝvingis ĝin kaj klinis ĝin posten, pli posten.

Kiam nia instruisto komplete absorbiĝis en sia legado, tio estis tre bona ŝanco por ni. Tiam kelkaj knaboj ludis pup-teatraĵon kun paperaj kaskoj sur siaj fingroj. Mi okupis min per pentrado, uzante “Jingchuan-papero” por kopii la ilustraĵojn de diversaj noveloj ĝuste kiel mi faris kaligrafian kopion. Ju pli da libroj mi legis, des pli da ilustraĵoj mi kopiis. Mi ne akiris bonajn sukcesojn en mia lernado, sed ja ne malmulte progresis en pikturo. La plej bonaj pecoj de miaj kopioj formis du grandajn volumojn de ilustraĵoj, la unua el la romano *Forbalao de banditoj* kaj la alia el *Pilgrimado al Okcidento*. Poste, ĉar mi bezonis monon, mi vendis ilin al riĉa kunlernanto, kies patro estis mastro de vendejo de staniola papermono uzata ĉe enteriga ceremonio. mi aŭdis, ke li mem nun jam fariĝis la mastro de la vendejo kaj baldaŭ promociiĝos al rango de ĝentlemano. Tiuj miaj kopiaĵoj eble jam delonge malaperis. (fino)

18 septembro

Notoj:

1. Pri Zhu Xi vd noton 8 de *La Bildlibro de Dudek Kvar Agoj de*

*Fileca Obeemo*. Ĉi tie Lusin nur volas diri, ke la familia nomo de tiu ĉi aĉetanto estis Zhu.

2. Runtu, kies reala nomo estis Zhang Runsui, estis priskribita en “Naskiĝloko”, novelo de Lusin. Li estis filo de kampulo kaj juna amiko de Lusin dum infanaĝo.

3. Dongfang Shuo (154-93 a.K.), sagaca koreteĝano kaj konsultanto de Imperiestro Wudi de han-dinastio, kiu regis dum 140-87 a.K.

4. La unua ŝtupo en la lernado por verki poemon laŭ klasika metriko.

5. El *Lunyu*, kiu konsistas el diroj de Konfuceo.

6. El *Jada Forsto de Paroloj por Infanoj*.

7. El *Libro de Ŝanĝoj*.

8. El *Libro de Historio*.

9. El rakonta poemo de Qing-dinastio priskribanta la arogantecon de Li Keyong (856-908), princo de Tang-dinastio, ĉe festeno.



tradukis **Guozhu**

## EL *LAŬZI*



### ĈAPITRO 79

(Tiu ĉi ĉapitro rekomendas solvi disputojn inter la popolo per la principo de “senagado”. Laŭ li oni ne devas meti malamikecon inter sin, ĉar la rankoro,

kiun postlasas la malamikeco, estas malfacile forigebla. Kiamaniere do oni povas havi nenan malamikecon inter si? La plej bona rimedo por tio estas agi kiel la nepostulema tenanto de la ŝuldatesta stumpon. Se oni tiel agas, oni ĉiam estas helpata de la Taŭo de la Ĉielo, kaj tia ago estos repagita per bono.)

Post kiam du partioj en granda malamikeco estas repacigitaj, devas resti ia rankoro.

Kiel do tio povas esti kalkulata kiel afero bona?

Tial la Saĝulo<sup>1</sup>, kvankam tenante la stumpon de ŝuldatesto,

Ne postulas de la debitoro la pagon.

La homo kun la Virto estas nepostulema kiel la tenanto de la ŝuldatesta stumpo;

<sup>1</sup> Vd. noton 1 de ĉap. 2.

## ĈAPITRO 80

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi esprimas sian admiron pri la antikveco kaj sian sopiron al sia Utopio, en kiu la popolo povus feliĉe vivi materiale kaj morale. Laŭzi idealigas la antikvecon kun la celo kritiki sian propran epokon.)

Malgranda estu la regno, kaj malmultenombra la loĝantaro.

Eĉ se diversspecaj iloj estus disponeblaj, oni ilin ne uzu.

La popolo ne risku sian vivon, nek transloĝiĝu malproksimen.

Kvankam posedante ŝipojn kaj kaleŝojn,

Oni havu nenian bezonon veturi per ili.

Kvankam havante armilojn kaj armaĵojn,

Oni trovu nenian okazon ilin elmontri.

La popolo revenu al la epoko de la uzo de ŝnurnodoj por registri aferojn:

Tiam ili nutrus sin per bongustaj manĝaĵoj,

Vestus sin per belaj vestoj,

Loĝus en komfortaj domoj,

Kaj trovus siajn morojn ĝojplenaj.

Kvankam la homoj de najbaraj regnoj estus recipooke videblaj,

Kaj la krioj de iliaj kokoj kaj la bojoj de iliaj hundoj estus reciproke aŭdeblaj,

Tamen ili neniam vizitus unu alian ĝis ili mortus de maljuneco.

## ĈAPITRO 81

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi ĵetas kelkan lumon sur tiajn kontraŭdirajn aferojn, kiel ekz. sincereco kaj malsincereco, beleco kaj malbeleco, boneco kaj malbonco, atentigante pri la nekonskvenco inter la ŝajno kaj la esenco de tiaj aferoj.)

La sincera parolo ne estas bela,

La homo sen la Virto estas kalkulema kiel la kolektanto de rentoj.

La Taŭo de la Ĉielo, kiu estas partia al neniu, Ĉiam helpas la bonajn homojn.

La bela parolo ne estas sincera.

La bona homo ne estas elokventa,

La elokventa homo ne estas bona.

Tiu, kiu multe scias, ne elmontras sian erudicion,

Tiu, kiu elmontras sian erudicion, ne multe scias.

La Saĝulo<sup>1</sup> rezervas al si nenion.

Ju pli Li helpas al aliaj, des pli multe Li posedas;

Ju pli multe Li donas al aliaj, des pli riĉa Li fariĝas.

La Taŭo de la Ĉielo estas utila al ĉio kaj malutila al nenio.

La Taŭo de la Saĝulo estas konkuri kontraŭ neniu en ĉio, kion Li faras.

<sup>1</sup> Vd. noton 1 de ĉap. 2. (fino)



elĉinigis Wang Congfang

## Poemoj de Ai Qing

### Mi Amas Ĉi Teron

Se mi estus birdo  
 devas mi per raŭka voĉ' prikanti ankaŭ:  
 la ter' frapata de ŝtormpluvo,  
 la river' indigna ja nin minacanta,  
 la furioza vent' blovanta senripoze,  
 la senkompare milda aŭrorlum' venanta el l'  
 arbaro...  
 Mi poste mortis,  
 miaj plumoj jen putriĝus en ĉi teron.

Pro kio larmoj ofte ludas en okuloj miaj?  
 Ĉar mi amas ja ĉi teron pro...profunde...



